



VIRTUALA
ESPERANTO-
KONFERENCO
ILEI

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ
PROGRAMO DE LA TAGO DE ESPERANTO KAJ
INTERLINGVISTIKO EN UNIVERSITATOJ

28-a de Julio 2020

25-31 Julio 2020

Informoj kaj aliĝoj: www.ilei.info

Komenchoro laŭ UTC	Komenchoro laŭ UTC+2 (Mezeŭropa Somera Tempo)	Komenchoro laŭ UTC+9 (Japanio, Koreio)	Komenchoro laŭ UTC-3 (Brazilo – horo de Braziljo)	Komenchoro laŭ UTC-7 (Okcidenta Usono)	Prelegantino, Preleganto
03h (28/Jul.)	05h (28/Jul.)	12h (28/Jul.)	00h (28/Jul.)	20h (27/Jul.)	Vicente Manzano ¹
04h	06h	13h	01h	21h	Grupo ILEI-ESF-UEA ²
05h	07h	14h	02h	22h	Nina Danylyuk
06h	08h	15h	03h	23h	Ilona Koutny
07h	09h	16h	04h	00h (28/Jul.)	Vicente Manzano
13h	15h	22h	10h	06h	So Jinsu
14h	16h	23h	11h	07h	Grupo ILEI-ESF-UEA
15h	17h	00h (29/Jul.)	12h	08h	Federico Gobbo
16h	18h	01h	13h	09h	Philippe Planchon
17h	19h	02h	14h	10h	Philippe Planchon
20h	22h	05h	17h	13h	Davide Astori
21h	23h	06h	18h	14h	Ivan Colling

¹ Ekde la 3-a horo UTC estos elsendata la registraĵo de la prelego, kaj tuj poste, je 3h45min UTC estos malferma diskuto pri la temo. Ĉi tiu prelego estos reelsendata ekde la 7-a horo UTC; tuj post ĉi tiu dua elsendo eblos interagi kun la preleginto.

² Ekde la 4-a horo UTC estos elsendata la registraĵo de la prezento de Grupo ILEI-ESF-UEA, kaj tuj poste, je 4h30min UTC estos malferma diskuto pri la temo. Ĉi tiu prezento estos reelsendata ekde la 14-a horo UTC; tuj post ĉi tiu dua elsendo eblos interagi kun anoj de la grupo.

Komenchoro laŭ UTC	Komenchoro laŭ UTC+2 (Mezeŭropa Somera Tempo)	Komenchoro laŭ UTC+9 (Japanio, Koreio)	Komenchoro laŭ UTC-3 (Brazilo – horo de Braziljo)	Komenchoro laŭ UTC-7 (Okcidenta Usono)	Prelegantino, Preleganto
03h (28/Jul.)	05h (28/Jul.)	12h (28/Jul.)	00h (28/Jul.)	20h (27/Jul.)	Vicente Manzano

Esperanta strategio en Universitatoj

En ĉi tiu momento estos elsendata la registraĵo de la prelego; tuj poste estos malferma diskuto pri la temo. La prelego estos reelsendata ekde la 7-a horo UTC (vidu sube en la programo ĝian resumon); tuj post ĉi tiu dua elsendo eblos interagi kun la preleginto.

Komenchoro laŭ UTC	Komenchoro laŭ UTC+2 (Mezeŭropa Somera Tempo)	Komenchoro laŭ UTC+9 (Japanio, Koreio)	Komenchoro laŭ UTC-3 (Brazilo – horo de Braziljo)	Komenchoro laŭ UTC-7 (Okcidenta Usono)	Prelegantino, Preleganto
04h (28/Jul.)	06h (28/Jul.)	13h (28/Jul.)	01h (28/Jul.)	21h (27/Jul.)	Grupo ILEI-ESF-UEA

ILEI-ESF-Laborgrupo pri Esperanto kaj Universitato

En ĉi tiu momento estos elsendata la registraĵo de la prezento de Grupo ILEI-ESF-UEA; tuj poste estos malferma diskuto pri la temo. La prezento estos reelsendata ekde la 14-a horo UTC (vidu sube en la programo ĝian resumon); tuj post ĉi tiu dua elsendo eblos interaĝi kun anoj de la grupo.

05h (28/Jul.)	07h (28/Jul.)	14h (28/Jul.)	02h (28/Jul.)	22h (27/Jul.)	Nina Danylyuk
---------------	---------------	---------------	---------------	---------------	---------------

Interlingvistiko kaj esperantologio en la universitata E-centro en Ukrainio

La prelego temas pri la universitata fakultativa kurso pri interlingvistiko kaj esperantologio en la E-centro en Lesja Ukrainka Volinia nacia universitato en Ukrainio, kiun estras profesoro, doktoro Nina Danylyuk ekde la jaro 2015. Estas uzataj scienc-metodikaj materialoj, kiuj troviĝas en la centro. La prelegon partoprenas la membroj de la urba E-kluba "Arbara kanto". La prelego estas dediĉita al la 20-jara Jubileo de la Ukraina Sekcio de ILEI kaj la 5-jara Jubileo de la Universitata E-Centro.

06h (28/Jul.)	08h (28/Jul.)	15h (28/Jul.)	03h (28/Jul.)	23h (27/Jul.)	Ilona Koutny
---------------	---------------	---------------	---------------	---------------	--------------

Universitata instruado de Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko

La internacia planlingvo Esperanto, ĝia scienca traktado kadre de esperantologio kaj interlingvistiko, malmulte konataj branĉoj de aplikata lingvistiko, maturiĝis por aperi en universitata oferto. Okazos sistemigo de diversaj universitataj kursoj kie Esperanto povas havi sian lokon (krom lingvokursoj, kursoj pri interlingvistiko, internacia kaj interkultura komunikado, memstaraj studprogramoj) kaj referenco al kelkaj reprezentantoj de universitataj medioj. Menciatis ankaŭ sciencaj kursoj en Esperanto kaj la mensoekzerca rolo de Esperanto en la universitatoj de la tria aĝo. Specialan atenton ricevos la rolo de Esperanto en internacia kaj interkultura komunikado. La preleganto rememorigas la unuan memstaran planan studprogramon en la universitato ELTE (en Hungario sub gvido de István Szerdahelyi) kiu instituciigis esperantologion kiel studdirekton antaŭ pli ol 50 jaroj kaj fokusiĝas al la mem iniciatitaj internaciaj postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en la universitato AMU (en Pollando) kiuj jam de pli ol 20 jaroj formas esperantologojn, interlingvistojn, instruistojn de Esperanto. Temos ankaŭ pri la ĉi-rilata scienca kunlaboro inter universitataj kolegoj.

Komenchoro laŭ UTC	Komenchoro laŭ UTC+2 (Mezeŭropa Somera Tempo)	Komenchoro laŭ UTC+9 (Japanio, Koreio)	Komenchoro laŭ UTC-3 (Brazilo – horo de Braziljo)	Komenchoro laŭ UTC-7 (Okcidenta Usono)	Prelegantino, Preleganto
07h (28/Jul.)	09h (28/Jul.)	16h (28/Jul.)	04h (28/Jul.)	00h (28/Jul.)	Vicente Manzano

Esperanta strategio en Universitatoj

La kutima maniero pensi pri la rilato inter Esperanto kaj Universitato konsistas el aro da kursoj kaj diskursoj pri la lingvo. Samtempe rimarkeblas diversaj klopodoj esperantigi sciencon, teknikon kaj superan edukadon. Tamen tiuj klopodoj plejparte havas malforton kaj algluatas al antaŭa sukcesa historio de la esperantista movado. Ĉi tiu prelego celas enmeti ian psikologian klarigaron en la komprenon de la relative malgranda sukceso inter ambaŭ eroj, Esperanto kaj Universitato. Pro tio, la unua parto priskribas kelkajn detalojn de la nuntempa homa konduto. La dua substrekas prikondutajn barilojn de la Universitato, kiel institucio kaj kiel individuaro. Kaj la tria klopodas aranĝi principojn por la starigo de konkreta strategio, bazitajn sur elekto de realaj spertoj. La kerno de ĉi tiu partopreno estas elstarigi la bezonon montri Esperanton kiel universitatilon, sen reklami ĝin.

13h (28/Jul.)	15h (28/Jul.)	22h (28/Jul.)	10h (28/Jul.)	06h (28/Jul.)	So Jinsu
---------------	---------------	---------------	---------------	---------------	----------

De 'Nova Realo' al 'Nova Normalo' – ŝanĝoj de kulturajo, preventado & Esperantujo

1. Ŝanĝoj de kulturaj eventoj dum Koronavirusa Pandemio
 - 1) Kulturaj eventoj en la erao de 'Nova Realo'
 - 2) Kulturaj eventoj okaze de la komenco de 'Nova Normalo'
2. Ŝanĝoj de preventado kontraŭ KOVIM-19 & Monda Ekonomio
 - 1) Preventado de landoj kontraŭ KOVIM-19
 - 2) Kiujn raportojn de la internaciaj organizoj ni devas atenti?
UN, UNESKO, IMF, FAO, UEA ...
3. Ŝanĝoj de esperantujo
 - 1) Ŝvelo de virtualaj renkontiĝoj en KAOEM
 - 2) MondaFest' & VK 2020, VEKI kaj vekigi
4. Epilogo: nur aŭde.

14h (28/Jul.)	16h (28/Jul.)	23h (28/Jul.)	11h (28/Jul.)	07h (28/Jul.)	Grupo ILEI-ESF-UEA
---------------	---------------	---------------	---------------	---------------	--------------------

ILEI-ESF-Laborgrupo pri Esperanto kaj Universitato

La Grupo por Universitata Agado ILEI-ESF-UEA celas arigi esperantistajn universitatanojn kaj pridiskuti la temon de Esperanto, Esperantologio kaj Interlingvistiko en Universitatoj. Dum la unua duonhoro, anoj de la grupo - Renato Corsetti, Vicente Manzano-Arrondo, Byelongo Elisée Isheloke kaj Ivan Eidt Colling - faros prezenton kaj estos elsendita intervjuo de Katalin Kováts kun Martin Ptasinski. Dum la dua duonhoro, la intenco estas instigi la partoprenantojn kuncerbumadi, kumpensadi pri eblaj vojoj de tiuj fakoj en Universitatoj kaj pri manieroj efektivi tiujn vojojn.

Komenchoro laŭ UTC	Komenchoro laŭ UTC+2 (Mezeŭropa Somera Tempo)	Komenchoro laŭ UTC+9 (Japanio, Koreio)	Komenchoro laŭ UTC-3 (Brazilo – horo de Braziljo)	Komenchoro laŭ UTC-7 (Okcidenta Usono)	Prelegantino, Preleganto
15h (28/Jul.)	17h (28/Jul.)	00h (29/Jul.)	12h (28/Jul.)	08h (28/Jul.)	Federico Gobbo

Ses difinoj serĉantaj fakon: interlingvistiko inter komuniko kaj fikcio

Interlingvistiko estas konata kiel la malortodoksa branĉo de lingvistiko, ĉar multaj aliroj kaj difinoj alvenis dum ĝia ekzisto, jam pli longa ol jarcento. Parafrazante la faman teatraĵon de la mondfama itala verkisto Luigi Pirandello, la prelego prezentas ses idealtipajn alirojn al interlingvistiko kiuj trairis ĝian historion kaj donas konkretan proponon, bazitan je la jardeka sperto sukcese instrui la fakon al universitataj studentoj en Italio kaj Nederlando

16h (28/Jul.)	18h (28/Jul.)	01h (29/Jul.)	13h (28/Jul.)	09h (28/Jul.)	Philippe Planchon
---------------	---------------	---------------	---------------	---------------	-------------------

Tipologiaj demandoj kaj perspektivoj rilate al la konstruitaj lingvoj

Tiu prelego pritraktas diversajn demandojn kiuj aperas, kiam oni provas karakterizi la konstruitajn lingvojn laŭ tipologia vidpunkto. Tipologio celas klarigi la diversecon de la lingvoj uzante specifajn kriteriojn, per kiuj eblas distingi diversajn lingvo-tipojn. La elekto de tiaj kriterioj estas malfacila demando. Necesas unue distingi inter lingvaj kriterioj (*lingvistikaj tipologioj*) kiuj rilatas al la strukturoj de la lingvoj, kaj sociaj kriterioj (*socilingvistikaj tipologioj*) kiuj rilatas al la sociaj kondiĉoj de uzo de la lingvoj. Tiukampe, la kategorio de la konstruitaj lingvoj estas fonto de miskomprenoj, kiel ni montros per ekzemploj de diversaj konstruitaj lingvoj. Pro tio, ofte ŝajnis oportune ellabori por la konstruitaj lingvoj apartajn kriteriojn (*interlingvistikaj tipologioj*), disde la kriterioj uzablaj por la aliaj lingvoj. Tamen, necesas pravigi la elekton de tiaj kriterioj, ĉu lingvistikaj, ĉu socilingvistikaj, tiel ke ili plu kongruu kun la studo de la propraj lingvoj de la homaj lingvoj. Tio estas aparte grava por Esperanto, sed ankaŭ por klarigi la proprajn lingvojn de aliaj konstruitaj lingvoj. Oni proponos plurajn perspektivojn por solvi tiun problemon, konsiderante diversajn apartaĵojn de la konstruitaj lingvoj.

17h (28/Jul.)	19h (28/Jul.)	02h (29/Jul.)	14h (28/Jul.)	10h (28/Jul.)	Philippe Planchon
---------------	---------------	---------------	---------------	---------------	-------------------

Diakronio kaj evolu-fazoj de la leksiko kaj de la vort-farado en Esperanto

Ĉar Esperanto estas vivanta lingvo, Esperanto estas lingvo kiu evoluas pro la efiko de la tempo. Aliflanke, tiu lingvo estas ankaŭ karakterizata kiel konstruita lingvo, tiel ke gravas ankaŭ la kondiĉoj de ĝia apero. Do necesas distingi malsamajn evolu-fazojn por tiu ĉi lingvo. Tio devenas de la rilatoj inter normoj, uzoj kaj uz-eblecoj, kaj tiuj rilatoj ludas rolon por ĉiuj aspektoj de la lingvo (fonologia, semantika, leksikologia, sintaksa, morfologia, ktp). Estas tamen aparte interese konsideri ĉi tie la strategiojn kiuj gravas por la ellaborado de la leksiko kaj de la vortfarado. Komence, la leksiko de Esperanto rapide evoluis, kaj tiu fenomeno estas analoga al tio, kion oni povas ankaŭ observi en aliaj lingvoj (leksika eksplodo). La ekzisto de kontraŭaj tendencoj dum la komenca fazo kondukis al multe pli longdaŭra evoluo, tiel ke realiĝas iuj uz-eblecoj kiuj jam ekzistis dekomence en la sistemo de la lingvo. Tiurilate, ni montros ke la vortfarado koncernas plurajn nivelojn en la funkciado mem de la lingvo, kio minacas la ekvilibron de la sistemo tra la uzado de la parolantoj. Tiu demando estas aparte interesa, ĉar de tiu demando dependas la ebleco pritaksi Esperanton kiel naturan fenomenon.

Komenchoro laŭ UTC	Komenchoro laŭ UTC+2 (Mezeŭropa Somera Tempo)	Komenchoro laŭ UTC+9 (Japanio, Koreio)	Komenchoro laŭ UTC-3 (Brazilo – horo de Braziljo)	Komenchoro laŭ UTC-7 (Okcidenta Usono)	Prelegantino, Preleganto
20h (28/Jul.)	22h (28/Jul.)	05h (29/Jul.)	17h (28/Jul.)	13h (28/Jul.)	Davide Astori

Interlingvistiko kaj Esperantologio en la nuntempa itala universitata medio

Tiu ĉi prelego celas prezenti la situacion de la instruado de 'Interlingvistiko' kaj 'Esperantologio' en la nuntempa itala medio, specife fokusante sur la agadon ĉe la Universitato de Parmo, hodiaŭ, post la bedaŭrinda finiĝo de la Torina sperto, la sola, kiu montras aktivan kaj specifan atenton: inter la diversaj kursoj, ne malofte spaco estas destinita al interlingvistiko, kaj dum la lastaj jaroj apartaj tagoj estis dediĉitaj al specifaj temoj; en la jaro 2019a festis la dekjariĝon la 'Premio «G. Canuto» por magistriĝa disertacio pri Interlingvistiko kaj Esperantologio'; kaj ekde 2020 eĉ ofertatas sendependa kurso pri 'Interlingvistiko'.

21h (28/Jul.)	23h (28/Jul.)	06h (29/Jul.)	18h (28/Jul.)	14h (28/Jul.)	Ivan Eidt Colling
------------------	------------------	------------------	------------------	------------------	-------------------

Esperanto kaj interlingvistiko en Federacia Universitato de Paranao, Brazilo: historio, atingoj kaj perspektivoj

En Federacia Universitato de Paranao (UFPR), en Kuritibo, ĉefurbo de ŝtato Paranao, Brazilo, estis tradicio de instruado kaj esplorado pri Esperanto pro la agado de Prof. Geraldo Mattos; ĝi estis tamen interrompita. En 2005, danke al la klopodoj de grupo de junuloj de Paranao Esperanto-Asocio (PEA), kursoj estis ekdisponigataj en CELIN, Centro de Lingvoj kaj Interkulturo, en kiuj povas partopreni kaj la interna universitata komunumo kaj la ekstera. Tiuj kursoj funkcias ĝis hodiaŭ. CELIN estas programo de Por-Komunuma Agado de UFPR; necesas kompreni, kio estas kaj kiel funkcias por-komunuma agado, agado ofta en latinamerikaj universitatoj, kiu nuntempe ekinteresas universitatanojn en aliaj partoj de la mondo. En ĉi tiu prelego mi intencas prezenti historian trarigardon de Esperanto en CELIN, la organizadon de la kursoj, nivelojn de kursoj, temojn en ili pritraktatajn kaj kelkajn decidojn faritajn laŭlonge de la tempo. Mi parolos ankaŭ pri la kresko de akcepto kaj prestiĝo de Esperanto en la Universitato, organizado de KER-Eksamensesioj, ekesto de por-komunuma projekto Lingvoj en Dialogo, kaj pri la akcepto de lernobjektoj *Esperanto 1*, *Esperanto 2* kaj *Interlingvistiko* kiel nedevigaj lernobjektoj de la novaj, reformitaj kursoj de Filologio, kiuj ekfunkciis ĉi-jare.

Biografioj

Davide Astori, magistrecio pri Beletro je klasika orientiĝo, doktoreco pri romanidaj lingvoj (LMU–Munkeno), diplomo pri paleografio (Ŝtata Arkivo de Parmo), ĵurnalisto, ekde 2015 asociita profesoro ĉe la Universitato de la Studoj de Parmo (Italio), post la hebrea, la araba kaj la sanskrita, instruas nun 'Generalan Lingvistikon', 'Interlingvistikon' kaj 'Lingvon rumanan'. Inter liaj ĉefaj interesoj substrekindas: kontakto inter lingvoj kaj kulturoj, semidaj lingvoj, tradukscienco, lingvoj kaj mondkonceptoj, lingvaj kaj sociaj minoritatoj, soci-lingvistikaj aspektoj de naciaj identecoj. Specife pri la lingvo internacia li nombras pli ol 30 sciencajn publikaĵojn. Kun la eseo "La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planado: interpopola dialogo kaj tutmonda interkompreno por Esperanto kaj Homaranismo" li gajnis (unuan) Premion "Luigi Minnaja" de la Belartaj Konkursoj de UEA 2011 (la prelego estas aŭdebla ĉe &t;http://www.youtube.com/watch?v=stW8V1AZ-VM&t;). Li ricevis la Premion "Maŭro La Torre" 2015 (de ILEI) per la esploralaboro "La tradukoj de Pinokjo: kiel evoluis Esperanto inter 1930 kaj 2003".

Ivan Eidt Colling naskiĝis en Sero-Largo, Brazilo. Li diplomitiĝis pri elektra inĝenierado, fiziko kaj filologio (polaj lingvo kaj literaturo; lingvopedagogio), magistriĝis kaj doktoriĝis pri elektra inĝenierado. Dum 18 jaroj li docentis en kursoj pri elektra inĝenierado en kvar Brazilaj universitatoj; de dek unu jaroj docentas en Federacia Universitato de Paranao (UFPR). Li esperantiĝis en 1986; li kaj lia edzino Rita de Moraes sekvis Post-Diploman Kurson pri Interlingvistikaj Studoj (UAM, Poznano, 2011-2014). De 2009, volontula instruisto (de 2013 kunordiganto) de Esperanto en Centro de Lingvoj kaj Interkulturo/UFPR; tie li plurfoje gvidis KER-Ekzamensesiojn. Premio Germain Pirlot (AIS-2016); Panteono (Edukado.net-2017). Antaŭ du jaroj li translokiĝis al Pola Fako de Departemento pri Polistiko, Germanistiko kaj Klasika Filologio. Li laboras en projekto por popularigo de sciencoj kaj kunordigas projekton *Lingvoj en Dialogo*, kiu celas sent-emigi lernejaĵojn pri lingva diverseco kaj disponigi lingvokursojn. Ano de Esplorgrupo *Filozofio, Scienco kaj Teknologioj*. De 2015 estrarano de ILEI, de 2018 ties vic-prezidanto.

Renato Corsetti naskiĝis la 29-an de marto 1941, vivis kaj studis en Romo tra la tuta lerneja sistemo ĝis la universitato. Studis unue ekonomio kaj poste lingvistikon. En la unua parto de sia vivo laboris en nacia banko kiel bank-direktoro pri komputilaj sistemoj, en la dua parto de sia vivo instruis en la universitato de Romo 'Psiĥopedagogion de lingvo kaj komunikado'. Okupiĝis pri Esperanto de la komenco de la 1960-aj jaroj kaj estis aktivulo je loka, landa kaj internacia nivelo unue en la junulara kaj poste en la ĝenerala movado. Esploris ĉefe pri lingvo kaj politiko, socilingvistiko, esperanto-scienco, akirado de lingvoj de la naskiĝo kaj instruado de lingvoj. Verkis pri ĉiuj ĉi tiuj kampoj en la itala, en Esperanto kaj foje en la angla. Lia aparta intereso estis la denaska akirado de Esperanto kaj profesie, krom instruado li partoprenis en eŭropaj projektoj por evoluigi instrumentadojn pri lingvoj por junaj lernantoj.

Nina Danylyuk esperantiĝis en 1977 j. en Kijivo (Ukrainio). Ŝi finis Taras Ŝevĉenko Kijivan universitaton, filologian fakultaton (fako ukraina lingvo kaj literaturo) kaj defendis du disertaciojn: por la grado de kandidato kaj por la grado de doktoro pri filologiaj sciencoj. D-ino Danylyuk estas la aŭtoro de 186 sciencaj laboraĵoj en la kampo de lingvostilistiko, leksikologio, etnolingvistiko, lingvokulturologio, interlingvistiko k.a. Nina Danylyuk prelegas por magistrantoj la specialan kurson "Artefaritaj lingvoj kaj interlingvistiko" kaj havas la fakultativan kurson de Esperanto por studentoj-filologoj. Krome ŝi organizis multajn internaciajn sciencajn konferencojn, la sciencan rondan tablon kaj gvidas universitatan E-centron (fonditan en la jaro 2015). En 2000–2009 kaj 2015–2020 jaroj Nina Danylyuk estis estro de ukraina sekcio de ILEI. Ŝi havas la diplomojn de ILEI kaj IEI. En 2009 jaro ŝi finis Interlingvistikajn Studojn en Adam Mickiewicz universitato en Poznań (Pollando). D-ino Danylyuk partoprenis internaciajn projektojn pri Interkulturo, multajn ILEI-konferencojn kaj ILEI-kongreson en Ĉaĉak, multajn UK-ojn, metodikan seminarion en IEI (2008, Hago) k.a.

Federico Gobbo (1974) estas ordinara profesoro pro speciala katedro ĉe la Universitato de Amsterdamo (Nederlando). La katedron Interlingvistiko kaj Esperanto sponsoras Universala Esperanto-Asocio (UEA). Li estis laŭkontrakta profesoro ĉe Universitato de Torino (Italio) por kurso pri Planlingvoj kaj Lingvoplanado. Li partoprenis la EU-projekton MIME (Movebleco, Inkluziveco en Multlingva Europo) ĉe la Universitato de Milano-Bicocca. Li posedas titolon de esplordoktoreco (latine: Philosophi Doctor, mallonge PhD) en Informadiko. En 2009, ĉe Universitato de Insubrio, (Varezo-Komo, Italio) li defendis anglalingvan disertaĵon pri adpoziciaj gramatikoj kaj Konstruiva Lingvistiko. Li instruis kursojn kaj esploris pri informadika kaj lingvistikaj temoj en multaj universitatoj. Aparte menciindas, ke en 2012 li estis vizitanta profesoro en Hajnano por Esperanto-Insulo, laŭ invito de Nankina Universitato (Ĉinio). Liaj ĉefaj esplorinteresoj estas: lingvopolitiko kaj -planado, (aparte: interlingvistiko kaj

esperantologio, kontestataj lingvoj, movebleco kaj multlingveco) kaj konstruiva lingvistiko (aparte: adpozicia argumentado, lingvolernado en la Metodo Montessori). Li publikigas fakajn tekstojn en multaj lingvoj, inkluzive de Esperanto.

Byelongo Elisée Isheloke (tre konata en Esperantujo sub la nomformo *Elisée Byelongo*) estas esploristo ĉe la Universitato de Kab-Urbo en Sud-Afriko. Li doktoriĝis en 2018 en Durbana Universitato de Teknologio pri Manaĝado kaj Administrado. Li reprezentas la Universitaton Espero de Kongolando. Li diplomiĝis pri pedagogio antaŭ ol forlasi Kongolandon. Li eklernis Esperanton en 1993 en Burundo, lando najbara al sia Kongo. S-ro *Mateso Bilimba* instruis al li kun aliaj la IL-on en lernejo *Ecole des Nations* [Lernejo de Nacioj]. Tuj post trimonata klasa lernado, *Elisée* mem povis flugi per Esperanto. *Elisée* konatiĝis kun *Hans Bakker*, kiu instruis al li Esperanton pli profunde, kaj sekvis la kurson *Ferrez* kiel programo. Tio ebligis al li fari ekzamenon por ricevi Diplomon de Esperanto ĉe UEA. Per internacia korespondado kun *Raita Pyhala* kaj Prof *Renato Corsetti*, *Elisée* havis oportunon kontribui al Esperanto-literaturo kun kelkaj verkoj inkluzive de akademiaj.

Ilona Koutny naskiĝis kaj edukiĝis en Hungario, ekde 1997 vivas en Pollando. Diplomiĝis pri matematiko, franca filologio kaj esperantologio, poste doktoriĝis pri lingvistiko en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (ELTE, HU) kaj habilitiĝis ĉe Adam Mickiewicz Universitato en Poznan (AMU, PL). Ŝi instruis esperanton dum jardeko (1986-95) ĉe la Esperanto-fako de ELTE. Longe ŝi okupiĝis pri komputa lingvistiko (ĉefe parolsintezo). Nun ŝi estas profesoro en AMU, estras la Hungaran Katedron (gvidas kursojn pri hungara lingvistiko) kaj gvidas la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn, kie ŝi prelegadas pri internacia kaj interkultura komunikado, esperanta lingvistiko kaj instruado de Esperanto. Pretigis kelkajn vortarojn (Hungara-Esperanta meza vortaro kun I. Szerdahelyi, trilingvajn laŭtemajn etvortarojn, Hungara-Pola temvortaro), redaktis librojn kaj revuon *Lingvo – Komunikado – Informado* (<http://jki.amu.edu.pl>), publikigis artikolojn en diversaj lingvoj. Membro de la Akademio de Esperanto (1998-2016), profesoro de AIS. Detala biografio kaj publikaĵlisto: <http://interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/Ilona.html> kaj en Nia diligenta kolegaro. Retadreso: ikoutny@amu.edu.pl.

D-ino **Katalin Kováts**, (HU/NL), lingvisto, redaktoro de www.edukado.net, trejnisto de lingvoinstruistoj. Ŝi gvidas metodikajn seminariojn en Poznano kaj dum Esperanto-aranĝojn, plie ankaŭ en RITE (Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net). Katalin nun redaktas la novan, kompletigitan eldonon de la *Manlibro pri instruado de Esperanto*. En la kontribuoj dum VEKI ŝi parolos precipe pri tiuj programoj kaj laboroj. Katalin organizas la KER-ekzamenojn de UEA kaj la budapeŝta ORIGO-ekzamen-centro, pri ties rezultoj kaj novaĵoj ŝi raportos dum VK. Ŝiaj du libroj *Poŝamiko* kaj *Ĉu vi aŭdis, ke ...?* multe vendiĝis kaj bone utilas en lernado kaj instruado de Esperanto. Kadre de ŝia programo *Ekparolu!* la geonkloj jam okazigis pli ol 2000 retajn Esperanto-lecionojn kaj per RISKO preskaŭ 1000 personoj ludis jam regule dum jaroj ĉiutage por kleriĝante lerni pri la movado, kulturo kaj lingvo Esperanto. Nuntempe ŝi faras intervjuojn kun interesaj personoj de la movado, inter tiuj ŝi paroligis ankaŭ Martin Ptasinski pri sia agado en germana universitato. El tiu filmo ni prezentos eron kadre de la programo pri universitatoj.

Vicente Manzano-Arrondo [Bisente Mansano-Arondo], Viko, estas profesoro pri esplorado de la homa konduto en la Universitato de Seviljo (Andaluzio, Hispanio). Doktoriĝis pri psikologio, pri edukado kaj pri ekonomio. Membras kiel fondinto en pluraj universitataj movadoj en Hispanio, kiel *Universitato kaj Socia Engaĝiĝo* kaj *Alia*

esplorado eblas, kiuj klopodas etikigi la universitaton kaj kunlaborigi ĝin kun la sociaj movadoj. Lia fako estas la studo de la lingva kaj universitata subpremadoj kaj la demokratiigo de la eblo esplori por la popoloj. Kutime prelegas pri konkretaj modeloj por la engaĝado de la universitatoj kaj la socia utileco de la scienca metodologio. Studentoj kelkfoje premiis lin. En 2010 estis elektita la plej bona profesoro el la lando de la Hispana Federacio de Studentoj pri Psikologio. Esperantiĝis en 2016 serĉante solvojn por la universitato. En <<https://personal.us.es/vmanzano/publicaciones.htm>> oni povas trovi malfermatajn publikaĵojn, ĉefe hispane.

Philippe Planchon estas ŝtata instruisto kaj esploristo en la Fakultato pri Literaturoj kaj Lingvoj de la Universitato de Tours en Francio. En 2013, li sukcese defendis doktorigan disertacion pri lingvistiko, post magistriĝo en lingvistiko kaj magistriĝo en filozofio. En 2014, li estis nomumita ĉe la Universitato de Tours kiel maître de conférences, kie li instruas nun lingvistikon, i.a. pri interlingvistiko, leksikologio, semantiko, pragmatiko, kaj kompara lingvistiko. Lia esplor-kampo estas la divers-eco de la lingvoj kaj la konstruado de la vortosignifoj. Li estas plenrajta membro de la lingvistika laboratorio LLL (Laboratoire Ligérien de Linguistique, UMR 7270, CNRS, www.lll.cnrs.fr/). Ekde 2008, li regule prelegis kaj publikigis diversajn artikolojn. Ĉe lia retpaĝo en la Universitato de Tours, troviĝas kelkaj referencoj de liaj publikaĵoj kaj prelegoj: <http://lettres.univ-tours.fr/infos-pratiques/m-planchon-philippe-423157.kjsp?>

Martin Ptaŝiński naskiĝis 1983 en Katowice/Pollando, ekde 1990 en Germanio. Jam kiel 14-jaraĝa junulo mi havis la unuan kontakton kun Esperanto en la lernejo. Post abituro mi plenumis la (tiam en Germanio ankoraŭ devigan) civilservon, dum kiu mi kiel 20-jaraĝulo lernis Esperanton. En la Esperanto-movado mi aktivis ekde 2011. Komence mi studis komputikon en la fakaltlernejo de Wiesbaden, kie mi dum mia propra studado okazigis la unuajn universitatajn Esperanto-kursojn. En 2013/2014 mi partoprenis la instruistan trejnadon de ILEI ĉe UAM en Poznań, kaj poste mi ekstudis slavistikon (nome la polan, ĉeĥan kaj ukrainan lingvojn) en Gießen/Germanio. Profesie mi estas instruisto de la pola, ĉeĥa kaj Esperanto en la popolaj altlernejoj de Frankfurto ĉe Majno kaj Gießen. Krome mi estas kunlaboranto de soraba eldonejo, kie mi verkas i.a. por sorablingvaj junularrevuoj.

So Jinsu estas profesoro pri Ekonomiko ĉe Kangnam Universitato, Koreio, kie li instruas pri Historio de Monda Ekonomio kaj Ekonomiko, Kulturekonomiko kaj Azia Ekonomio. Li estas prezidanto de AMRI - Art Market Research Institute / Privata Studinstituto de Belarta Merkato. Esperantisto ekde 1969 (je 13-jara); eksestrarano de ILEI pri Universitataj Aferoj 1992-1994; estrarano de UEA pri Azio kaj Oceanio (2019-); prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (2019-) kaj eksa prezidanto de KAOEM (2016-2019).

Organizantoj

Ivan Eidt Colling
Renato Guedes Filho
Rita Mara Netto de Moraes
Ricardo Potozky de Oliveira
Luiz Fernando Dias Pita
Marcionilo José de Vasconcelos Neto